



Ĉarto de la loka partnero

Kiel funkcias la Ter-Festivalo de la ?

La Ter-Festivalo devus okazi en ĉiuj landoj de la planedo, dum la 3a aŭ 4a semajno de junio, tio estas ĉirkaŭ la 21-a de junio, dato de la solstico.

Tiu semajno, kiu enhavas 7 tem-tagojn nomiĝas « Koro de la Festivalo ».

Ĉiu lando el la mondo estas kunorganizanto de Ter-Festivalo kaj organizas sian propran naciajn Festivalon enlande.

En ĉiu partoprenanta nacio, la surloka organiz-teamo nomiĝas « **Loka partnero** ».

La « Organizanta Komitato de la Festivalo », nuntempe konsistanta el membroj de la franca asocio « Terralliance » (Teralianco), iniciatinto de la Festivalo, decidas pri la temoj kaj objektivoj de la Festivalo.

Ĉiu lando estas invitita enskribi siajn proprajn okazaĵojn en la oficiala TTT-ejo, kiu kolektas kaj listigas la eventojn proponitajn de la diversaj partoprenantaj landoj.

La oficiala TTT-ejo plenumas la kunordigon kaj la interlandan diskonigon de la eventoj.

Artikolo 1 : Temoj kaj celo de la Ter-Festivalo

La temoj subtenataj de la Ter-Festivalo estas jenaj :

1/ Protektado de la Planedo Tero

2/ Solidareco inter la Homoj

3/ Paco inter la Popoloj

La Ter-Festivalo celas evoluigi la agadmanieron de ĉiu individuo kaj kreskigi la nombron de solidarec-retojn planed-nivele, en rilato kun la 3 ĉi-supraj temoj.

Artikolo 2 : Senpaga Partopreno

Ĉiu lando el la Mondo estas invitita partopreni en la **Kvina Festivalo de la planedo Tero**. La partopreno estas tute libera kaj senpaga.

Artikolo 3 : Po unu oficiala kun-organizanto en ĉiu lando

En ĉiu partoprenanta lando, oni nomas « **Loka Partnero** », la teamon kiu organizas la festivalon surloke. Tiu **Loka Partnero** estas la sola oficiala kontakto de la « Organizanta Komitato » en la koncerna lando.

Artikolo 4 : Karakterizaĵoj de la loka Partnero

Jen la bazaj kriterioj de taŭga **Loka Partnero** :

* Esti humana organizaĵo / asocio / fondaĵo aganta en unu aŭ pluraj el la 3 kampoj difinitaj en la Artikolo 1;

* Havi minimuman sperton en la organizado de naciaj kaj internaciaj aranĝoj;

* Bone koni la naciajn retojn agantaj en la kampoj de la Artikolo 1;

* Esti sendependa de ĉiu religio, politika partio aŭ industria medio.

La **Loka Partnero** estos strikte selektita laŭ ĉi-supraj kriterioj kaj laŭ rekomendoj de la loka reprezentanto de UNESKO, kiam tio eblas.

Artikolo 5 : Respekto al la Ĉartoj / Definitiva Enskribo:

La Loka Partnero estas en akordo kun la **Ĉarto de la Asocio Teralianco** kaj kun tiu ĉi **Ĉarto de la Ter-Festivalo**.

Ĝia definitiva enskribo validas ekde la 2a jaro de organizado de la loka Festivalo. Kaze de manko de la **Loka Partnero** aŭ de nerespekto de la ĉartoj, la Organizanta Komitato rajtigas sin elekti alian **Lokan Partneron**.

Eĉ se la **Loka Partnero** ne partoprenis en la unuaj organizadoj de la Festivalo, ĝi enskribiĝu en la tiam prepariĝanta Monda Festivalo (ekzemple, en 2009 ĉiu partoprenanta lando festos la 5an organizadon de la Festivalo, eĉ se ĝi ne festis la antaŭajn.)

Artikolo 6 : Rajtoj de la Loka Partnero

6.1/ Loka organizado de la Festivalo :

La **Loka Partnero** agnoskita de la Organizanta Komitato rajtas tutlibere organizi kaj kunordigi loke la Ter-Festivalon kondiĉe ke estu respektataj la Ĉarto de la Festivalo kaj la spirito de tiu aranĝo.

6.2/ Registrado de la marko :

Nur en sia lando kaj nome de sia organizo, la **Loka Partnero** rajtas registri kiel nacian markon, la markon « *Festival de la Terre* » (Ter-Festivalo) aŭ ĝian tradukon en la loka lingvo, informante la Organizantan Komitaton pri la rezulto de la registro-peto. Tiu marko-registrado gravas ĉar ĝi iel garantias la pludaŭron de la aranĝo.

6.3/ Eksploatado de la marko « *Festival de la Terre* » :

La **Loka Partnero** tute libere povas loke eksploatadi la markon « *Festival de la Terre* » kondiĉe ke la etiko de la Ter-Festivalo estu respektata.

Artikolo 7 : Rolo de la loka Partnero

7.1/ nacia kunordigado :

En ĉiu partoprenanta lando, la **Loka Partnero** respondecas pri elekto inter la lokaj grupoj, kiuj deziras partopreni en la Festivalo, kontrolante ke ĉiu kandidato kongruas kun la etiko de la Festivalo kaj respektas la Ĉarton. Tiu **Loka Partnero** prenas sur sin la konordigadon de la lokaj iniciatoj tiel ke estu garantiata la plej bona disvolviĝo kaj videbleco de la Ter-Festivalo. Ĝi engaĝiĝas naci-skale promocii la **Internacian Semajnon de la Ter-Festivalo** nomita « Koro de la Festivalo ».

7.2/ monda kunordigado :

Se neceso kontribuo de ĉiuj landoj por certigi la sukceson de monda iniciato, la **Loka Partnero** nepre subtenos tiun mondan iniciaton laŭ siaj eblecoj.

7.3/ Elekto de financaj partneroj kaj lokaj sponsoroj :

La lokaj financaj partneroj, sponsoroj kaj mecenatoj elektitaj de la **Loka Partnero** devos respekti la valorojn de la Festivalo. La **Loka Partnero** atentos por ne kunlabori loke kun politikaj kaj religiaj grupoj; la elektitaj ekonomiaj agantoj krome devos atesti pri respekto al la planedo.

7.4/ kreado de loka TTT-ejo :

Kiel eble plej frue post ĝia elektado far la Organizanta Komitato, la **Loka Partnero** devos krei kaj ekfunkcii TTT-ejon por prezenti la Ter-Festivalon al la popolo de sia lando. Tiu TTT-ejo havos ligilojn de/al la oficiala TTT-ejo de la Festivalo.

Artikolo 8 : Responsecoj de Terralliance (Teralianco) :

Terralliance prizorgas la kunordigon kaj la superkontrolon de la Festivalo mondscale, vigligante la reton de la **Lokaj Partneroj**. Krome *Terralliance* estas la **Loka Partnero** por Francio.

Terralliance devontigas sin sciigi al la **Loka Partnero**, tuj post ĝia ekiĝo, pri ĉiuj identigitaj kontaktoj en la koncerna lando, kiuj deziras partopreni en la Festivalo, t.e. individuoj, firmaoj, asocioj, grupoj, k.s.

Terralliance transdonos al la **Loka Partnero** la emblemon de la Ter-Festivalo por uzado en la lando.

* * * * *

Por [ricevi informojn en esperanto](#) pri la agad-proponoj en via lando aŭ [por iĝi partnero](#), bonvolu turni vin al (sen la spacetoj antaŭ kaj post @) :

Emile Mas : <espergala @ wanadoo.fr>

aŭ Elisabeth barbay : <eliz.barbay @ wanadoo.fr>

* * * * *